

Fundamenta gramatiko de la lingvo Esperanto en la lingvo Esperanto

(Oficiala traduko)

Avizo

Ĉi tiu teksto estas kompilaĵo de la 5 nacilingvaj gramatikoj fundamentaj. Laŭeble ĝi sekvas la zamenhofan Gramatiketon el la «Fundamenta Krestomatio», kvankam kelkaj el ties arkaikiĝintaj terminoj estas modernigitaj (ekzemple ni diras finaĵo anstataŭ finiĝo). La pecoj prenitaj el la Gramatiketo aperas en la tiparo serifa; la pecoj iel redaktitaj aŭ nove tradukitaj, en tiparo senserifa; komentoj kaj klarigoj eksterfundamentaj aperas en manskribeca tiparo (kiu ankaŭ estas la ĉeftiparo de ĉi tiu Avizo).

Mallongigoj:

AG — la Fundamenta gramatiko anglalingva;

FG — la Fundamenta gramatiko francilingva;

FK — la «Fundamenta Krestomatio»;

GG — la Fundamenta gramatiko germanlingva;

PG — la Fundamenta gramatiko pollingva;

RG — la Fundamenta gramatiko ruslingva;

A) Alfabeto

	France	Angle	Germane	Ruse	Pole
Aa	â [a]	kiel <i>a</i> en <i>last</i>	a		
Bb	b	kiel <i>b</i> en <i>be</i>	b		
Cc	ts	kiel <i>ts</i> en <i>wits</i>	c, z		
Ĉĉ	tch	kiel <i>ch</i> en <i>church</i>	tsch		
Dd	d	d (do)	d		
Ee	é [e]	kiel <i>a</i> en <i>make</i>	e		
Ff	f	kiel <i>f</i> en <i>fly</i>	f		
Gg	g dur (gant)		g		
Ĝĝ	dj		dsch; kiel <i>g</i> en la angla <i>gentleman</i>		
Hh	[h]		h		
Ĥĥ	[x]	kiel <i>ch</i> en la skota <i>loch</i>	ch		
Ii	i		i		
Jj	y (yeux)		j		
Ĵĵ	j		sh, kiel la franca <i>j</i> en <i>journal</i>		
Kk	k		k		
Ll	l		l		
Mm	m		m		
Nn	n		n		
Oo	ô [o]		o		
Pp	p		p		
Rr	r		r		
Ss	ss, ç		ss		
Ŝŝ	ch (chat)		sch		
Tt	t		t		
Uu	ou		u		
Ŭŭ	(kiel en la germana <i>laut</i>)	kiel <i>u</i> en <i>mount</i> (uzata en diftongoj)	kiel la mallonga <i>u</i> en <i>glau-ben</i> ; nur post vokalo	kiel <i>u</i> en germana <i>kaufen</i> aŭ en latina <i>laudo</i> ; nur post vokalo	
Vv	v		w		
Zz	z		kiel <i>s</i> en <i>lesen</i>		

Rimarko. Presejoj, kiuj ne posedas la literojn *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ*, povas anstataŭ ili uzi *ch, gh, hh, jh, sh, u*.

B) Parolelementoj

1. Artikolo nedifinita ne ekzistas; ekzistas nur artikolo difinita (*la*), egala por ĉiuj genroj, kazoj kaj nombroj.¹

2. La **substantivoj** havas la finaĵon *o*. Por la formado de la multenombro oni aldonas la finaĵon *j*. Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo; la lasta estas ricevata el la nominativo per la aldono de la finaĵo *n*. La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj (la genitivo per *de*, la dativo per *al*, la ablativo per *per*² aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco). Ekzemple por la radiko *patr`*:

- ***la patr`o*** (nominativo) *estas bona* [FE §8]
- *la ĉapelo de la patr`o* (kazo poseda, genitivo) [FE §8];
- *diru al la patr`o* (dativo) [FE §8];
- *mi amas la patron* (objekta kazo, akuzativo);
- *venu kune kun la patr`o*;
- ***la patr`o`j*** (nominativo multenombra);
- ***la patr`o`j`n*** (akuzativo multenombra);
- ***por la patr`o`j***.

3. La **adjektivo** finiĝas per *a*. Kazoj kaj nombroj kiel ĉe la substantivo. La komparativo estas farata per la vorto *pli*, la superlativo per *plej*; ĉe la komparativo oni uzas la prepozicion *ol*. Ekzemple: *pli balnk`a ol neĝ`o*.

4. La **numeraloj** fundamentaj (ne estas deklinaciaj) estas: *unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil*. La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj. Por la signado de numeraloj ordaj oni aldonas la finaĵon de la adjektivo; por la multoblaj — la sufikson *obl*, por la nombronaj — *on*, por la kolektaj — *op*, por la

1 **Rimarko** (en la gramatiko rusa kaj en FK). La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj.

La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas en la unua tempo tute ĝin ne uzi.

2 Tiel en FG, RG, PG kaj FK; dum EG kaj DG por la ablativo rekomendas la prepozicion *kun*.

disdividaj — la vorton *po*. Krom tio povas esti uzataj numeraloj substantivaj kaj adverbaj.

5. **Pronomoj** personaj: *mi, vi, li, ŝi, ĝi* (pri objekto aŭ besto), *si, ni, vi, ili, oni*; la pronomoj posedaj estas formataj per la aldono de la finaĵo adjektiva. La deklinacio estas kiel ĉe la substantivoj.

.